**NSiR - Nova Sento in Rete**
**N. 1053 (23/2020)**

Aperiodico della Federazione Esperantista Italiana

Federazione Esperantista Italiana: posta fei@esperanto.it ; internet http://www.esperanto.it
Itala Esperantista Junularo: posta iej@esperanto.it ; internet http://iej.esperanto.it
Via Villoresi, 38 IT-20143 Milano Tel 02 58100857

Mandate i vostri contributi a: Norberto Saletti, notiziario@esperanto.it
indicando nell'oggetto "Per Nova Sento in Rete"
NON RISPONDETE AL MESSAGGIO CON CUI ARRIVA NSiR
I messaggi che arrivano al sistema non vengono gestiti.
Le lettere non firmate non saranno pubblicate.

Tutto il materiale distribuito da NSiR è riproducibile citandone la fonte.

**ISCRIVETEVI ALLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA**
http://www.esperanto.it/iscrizione-fei.htm
**LIBRERIA**
http://www.esperanto.it/libri.htm
feilibri@esperanto.it
**INCONTRI ESPERANTISTI IN ITALIA**
Il Congresso Nazionale: http://kongreso.esperanto.it
Il Festival Giovanile di Pasqua: http://iej.esperanto.it/ijf

**IL 5 PER MILLE ALLA FEI**
Indicate il codice fiscale **80095770014** nella vostra dichiarazione dei redditi, realizzeremo grandi progetti!

Indice articoli

- Pardonpetojn al la gelegantoj .......... 2
- Alvoko al kunmanĝado tra la mondo, la 5an de aŭgusto .......... 2
- Un sito dedicato a Zamenhof .......... 2
- Intervista a Carlo Minnaja sulla rivista Treccani .......... 3
- Paĝo de Facebook kolektas komentojn en Eo pri la estonteco de UN .......... 3
- Esperanto 125: Mazara del Vallo .......... 3
- Interessante iniziativa per informare .......... 4
- Programo de la Unua Virtuala Kongreso .......... 5
- Eh, tio ne okazus, se oni uzus Eon .......... 7
- Montreale, virtuale .......... 7
- E sono 133! .......... 8
- Pillole di Salvezza 1053: .......... 9

## PARDONPETOJN AL LA GELEGANTOJ

Pardonu la malfruon de tiu ĉi numero, kiun kaŭzis paneo de la tuta hejma komputilaro, ĉefe de tiu en kiu kuŝis la jam preskaŭ preta NSiR 1053.

## ALVOKO AL KUNMANĜADO TRA LA MONDO, LA 5an DE AŬGUSTO, MERKREDON 16:00-18:00 UTC

Unu el la tradiciaj eroj de la Universalaj Kongresoj estas la bankedo. Estas facile konstati, ke kunmanĝado estas unu el la plej bazaj kaj unuecigaj manieroj kunesti por homoj de ĉiuj kulturoj, de ĉiuj anguloj de la planedo kaj tra ĉiuj historiaj epokoj de la homara evoluo. Sed en la jaro 2020 ni alfrontas la eksterordinaran defion kreitan de pandemio, kiu aparte limigas la eblecon kunesti kaj kunmanĝi. La organizantoj de tiuj ĉi eventoj decidis trovi kreeman manieron festi nian homecon kaj festeni en la Virtuala Kongreso de Esperanto (VK): http://vk.mondafest.net/. UEA invitas vin ĉiujn partopreni la aranĝon "Kunmanĝado tra la Mondo", okazonta la 5-an de aŭgusto, merkredon, 16:00-18:00 UTC. Dum tiu ĉi tempo la partoprenontoj montros al la cetera mondo kiel ili festas per manĝado de luksaj pladoj en hejma etoso kaj kiel la manĝaĵoj estis preparitaj (esperebleble diskonigante la receptojn). Kompreneble pro la diferenco en la loka horo por ĉiuj partoprenantoj tiu hejma kunfestado povos esti de frua matenmanĝo ĝis plej malfrua vespermanĝo, kio ne estas malhelpo, sed donos pli da vario al la tuta aranĝo. La organizantoj de la programero petas proponojn por partopreno en la aranĝo. La apartaj eroj daŭros averaĝe 5 minutojn. Ili nepre havu viv-elsendotan parton, kie homoj solaj aŭ en familia rondo gustumas la montritan pladon, kiun ili priskribos, kaj ĝi povas havi parton antaŭregistritan kiu montros la pretigadon de la manĝaĵoj. Limdato por sendado de proponoj estas la 25-a de julio 2020. La organizantoj kontaktos la proponintojn tuj post tiu dato por finaranĝi la detalojn. Bonvolu sendi senprokrakste viajn proponojn al vkk@esperanto.org. Bonan apetiton!

## UN SITO DEDICATO A ZAMENHOF

Un sito interamente dedicato al Majstro, che comprende anche l'unico filmato esistente che lo mostri, si trova a questo indirizzo: https://zamenhof.info/it/.

## INTERVISTA A CARLO MINNAJA SULLA RIVISTA "TRECCANI"

Su "Chiasmo", rivista dell'Istituto "Treccani", è comparsa una bella intervista a Carlo Minnaja

http://www.treccani.it/magazine/chiasmo/extra/iuss_esperanto.html

## PAĜO DE FACEBOOK KOLEKTAS KOMENTOJN EN ESPERANTO PRI LA ESTONTECO DE UN

La paĝo Facebook **UN75 en Esperanto**, lanĉita kunlige kun la enketo de UN pri la opinioj de la publiko pri la estonteco de UN, jam havas membrojn en 54 landoj, nome:

Alĝerio, Argentino, Bangladeŝo, Barato, Belgio, Benino, Bolivio, Brazilo, Britio, Bulgario, Butano, Ĉeĥio, Ĉilio, Etiopio, Fiĝio, Finnlando, Francio, Germanio, Grekio, Gvatemalo, Hispanio, Hungario, Irako, Irlando, Israelo, Italio, Kamboĝo, Kanado, Kolombio, Kongo D.R., Kostariko, Kubo, Laoso, Liberio, Litovio, Malajzio, Maroko, Moldavio, Nepalo, Niĝerio, Norvegio, Nov-Zelando, Pakistano, Palestino, Peruo, Pollando, Rusio, Serbio, Svedio, Tunizio, Turkio, Turkmenio, Ugando, Usono.

Ĉiuj parolantoj de Esperanto estas petataj partopreni en tiu ĉi kampanjo por difini la estontecon de Unuiĝintaj Nacioj en la venontaj 25 jaroj. Bonvolu ankaŭ partopreni la enketon ĉe https://un75.online/?lang=epo

## ESPERANTO 125 – MAZARA DEL VALLO

Come fa notare la sempre attenta Alga Guernieri, sono scomparse dal sito del **Comune di Mazara del Vallo** le schede della serie **Esperanto 125**. A quanto pare, il sito del Comune è stato rimodernato, quindi forse si tratta di una sparizione temporanea, ma vorrei approfittarne per proporvi di un paio di spunti di riflessione:

1) è un **male** che, dalla memoria dei luoghi in cui l'esperanto ha permesso di costruire qualcosa di importante, spariscano proprio i riferimenti all'esperanto;

2) è un **bene** che esista l'archivio FEI di ***bitoteko.it***, perché permette di salvare (almeno parte di) quella memoria (tutte le schede Esperanto 125 si trovano per esempio su http://www.bitoteko.it/collections/show/15).

E allora, vi invito a scrivere un messaggio al Comune di Mazara del Vallo, chiedendo il ripristino delle schede (qui la pagina di contatto:

https://www.comune.mazaradelvallo.tp.it/it/contact; in calce, il testo del messaggio che io ho già inviato). E, se volete, a salvare e rendere disponibile altro materiale: la Bitoteko.it è pronta ad accoglierlo..

Amike,

*Daniele BINAGHI*

--messaggio al Comune di Mazara del Vallo--

Oggetto: Mazara del Vallo, vocazione esperantista e schede Esperanto 125

Testo: Buon pomeriggio. Ho notato che dal sito del vostro Comune sono sparite molte informazioni, forse a causa di un aggiornamento del sito stesso; tra queste, anche le informazioni relative alla lingua internazionale Esperanto, come le schede Esperanto 125 ed ogni cenno al 79° Congresso Italiano di Esperanto tenutosi nel vostro comune dal 17 al 25 agosto 2012. Mazara del Vallo, città multietnica e multiculturale, si aprì in quell'occasione anche ad esperantisti italiani e stranieri, dimostrando la propria ospitalità e contribuendo a creare qualcosa di speciale.. Ritengo sia un peccato che la memoria di tutto ciò sparisca, e spero che possiate quanto prima ripristinare la presenza di tali informazioni, con l'augurio che ancora tanti esperantisti continuino a visitare Mazara..

Cordiali saluti, amike,

## INTERESSANTE INIZIATIVA PER INFORMARE

L'instancabile Gianni Conti ha redatto questo opuscolo di informazione, con accenni di storia, filosofia e grammatica, molto semplice e molto efficace. Ventotto pagine, che includono anche l'elenco dei gruppi italiani, da richiedere al servizio librario della FEI.



## PROGRAMO DE LA UNUA VIRTUALA KONGRESO

Kadre de la Monda Festivalo de Esperanto, la **Virtuala Kongreso (VK), de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto**, proponos buntan programon, kies unua gustumo troviĝas ĉi-komunike kaj superrigarde ĉe Eventa Servo: eventaservo.org/e/VK, daŭre ĝisdatigata. Ĝisdatigoj estos komunikitaj ankaŭ per la Festivala Kuriero, kiu dum la VK aperos ĉiutage. Ĉiuj bonvenas aboni: mondafest.net/kuriero/.

Por partopreni necesas registriĝi: **ĝis la 26-a de julio** individuaj membroj de UEA rajtas tion fari senpage ĉe vk.mondafest.net/, kaj ne-membroj en 2020 povas samtempe (re)aliĝi al UEA kaj ĝui la senpagan partoprenon al la VK. Tiuj, kiuj eventuale ne volas aliĝi al UEA, povas same partopreni kontraŭ kotizo.

La VK okazos per reta sistemo, kiu permesos al partoprenantoj spekti prelegojn kaj interagi en apartaj "ĉambroj" de la VK-ejo. Temos pri unika sperto! Ĉiuj informoj pri kiel aliri tiun sistemon estos senditaj al kongresanoj en la venontaj semajnoj. Ĉar frua aliĝado helpos plej efektive organizi la eventon, UEA sincere ĝojas, ke jam pli ol 700 homoj aliĝis al la VK.

La kerna programo okazos inter 12:00-18:00 UTC. Ĝi inkluzivos tradiciajn programerojn de la Universala Kongreso, tamen en nova virtuala formato. Specifajn petojn (ekzemple kunvenoj de Fakaj Asocioj) bv. sendi al la Virtuala Kongresa Komitato (VKK), laŭ la retadresoj vkk@esperanto.org kaj mondafest2020@googlegroups.com. Tien ankaŭ eblas sendi aliajn proponojn, programerojn por la internaciaj artaj horoj kaj virtualajn objektojn por la Aŭkcio.

La VK-teamo laboras por ke ĉiuj povu sperti plej interesajn programerojn, kun prelegantoj de ĉiuj mondopartoj:

* la **Virtuala Movada Foiro** ebligos interagadon kun dekoj da Esperanto-organizoj dum la tuta eventa semajno;

* diskutoj pri la **Festivala Temo** "UN 75-jara: dialogo kaj interkompreniĝo en ŝanĝiĝanta mondo" okazos tra aro da programeroj pri Unuiĝintaj Nacioj kaj la kolonoj de Paco, Homaj Rajtoj kaj Daŭripova Evoluigo de UN, krom aliaj prelegoj pri la laboro de Eksteraj Rilatoj de UEA, kiel Esperanto kaj Unesko kaj historie ĉe la Ligo de Nacioj;

* la **Scienca Kafejo** proponos kvar klerigajn prelegojn: Komunikaj teknologioj en indiĝena aktivismo (Manuela Burghelea, Rumanio/Skotlando); La Kanada Odiseado, Lando Bazita sur Nekompletaj Konkeroj (Wallace George du Temple, Kanado); La Valoroj de Esperanto en Ŝanĝiĝanta Mondo (John Huang, Ĉinio/Kanado); Popolaj fabeloj kiel ilo por krei dialogon kaj trovi interkompreniĝon en la ŝanĝiganta mondo (Anna Striganova, Rusio);

* kadre de la **Jaro Hodler,** prezidantoj de UEA kaj TEJO debatos kun eks-prezidantoj pri la estonteco de Esperanto ĉe "Esperanto: de 1887 al 2087";

* en la **Faka Forumo**, renkontiĝo de Fakaj Asocioj, eblos konatiĝi kun la aktuala Faka Agado en Esperanto;

* kaj similan interagadon la publiko povos ĝui ankaŭ kun aliaj grupoj, kiel la Akademio de Esperanto, TEJO, redaktoroj de Esperanto kaj Kontakto kaj la Estraro de UEA.

Dum la VK ankaŭ okazos la 73-an sesio de la **Internacia Kongresa Universitato** kaj de Akademio Internacia de la Sciencoj. Sub gvidado de la IKU-rektoro Geoffrey Greatrex okazos 7 prelegoj: Alproprigo de dua lingvo: ĉu ebla post la infanaĝo? (Grant Goodall, Usono); La ora nombro (François Lo Jacomo, Francio); Romianoj kaj persoj en la malfrua antikvo: milito, arto kaj kulturo (Geoffrey Greatrex, Kanado/Britio); Veturado tra la interplaneda spaco (Carlos Spinola, Hispanio); Esperanto kaj la Dua Mondmilito: postmemora aliro al transnaciaj rakontoj (Pascal Dubourg Glatigny, Francio); Geopolitiko, remalkovrita fako (Javier Alcalde, Katalunio/Hispanio); Genetiko kaj Koro (Keyhan Sayadpour, Irano).

Riĉan programon ofertos ankaŭ la **Tago de Lernado**, kunlabore kun ILEI, mardon. Kun malfermaj paroladoj de la prezidantoj D. Charters (UEA) kaj M. Grosjean (ILEI), la Tago proponos 6 prelegojn kun diskutoj: Mireille Grosjean (Svislando): La kolera manĝo, leciono de ĉiuj danĝeroj; Ilona Koutny (Pollando): Eduka valoro de Esperanto en diversaj niveloj de instruado; Penny Vos (Aŭstralio): Strategio por enkonduki Esperanton en lernejoj; Mireille Grosjean (Svislando): Praktika Ekzercado: Ni konatiĝu konkrete kun la Homaj Rajtoj; Monika Molnar (Svislando): Infanrajtoj konkrete, nia-lerneje; Katalin Kovats (Nederlando) kaj Margaret Zaleski Zamenhof (Francio): La malfacila lingvo.

En la venontaj tagoj la VK-teamo pli detale diskonigos aliajn klerigajn kaj kulturajn programerojn, kiel

* programerojn de la **Monda Ekskursa Tago**: virtualaj ekskursoj tra famaj turismaĵoj de la mondo;

* **Kunmanĝadon tra la Mondo**: kun prezento de pladoj el diversaj kulturoj;


* **Aŭtoraj Momentoj** kaj Libroj de la Jaro: vivaj renkontiĝoj kun konataj verkistoj kaj eldonistoj;

* Kaj multe da artaj aranĝoj.

Kun granda ĝojo UEA vin invitas al la VK!

## EH, TIO NE OKAZUS, SE ONI UTILIGUS ESPERANTON

Mia oficeja komputilo utiligas, kiel multaj, "Office 365": mi petis al la komputilo, ke ĝi uzu la italan. Jen la rezulto…




## MONTREALE, VIRTUALE: KANADO EN LA VIRTUALA KONGRESO DE ESPERANTO (VK) KAJ MONDAFEST' 2020

Eĉ se la montreala UK de 2020 devis esti prokrastita al 2022, la Virtuala Kongreso de Esperanto (VK), okazonta de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto – precize en la datoj, kiam devis okazi la 105-a UK –, enhavos multe da kontribuoj el Montrealo kaj Kanado, por memorigi la partoprenantaron pri tio, kio devus okazi en Kanado ĉi-jare kaj ankaŭ por doni al ili antaŭguston pri tio, kio okazos en 2022. Aliĝi al la VK eblas per vk.mondafest.net (senpage por individuaj membroj de UEA ĝis la 26-a de julio).

Krom la diversaj partoprenoj de Kanado jam aperintaj kadre de la Monda Festivalo de Esperanto (MondaFest' 2020), kiel ĉe la Somera Inaŭguro, la Kanada Virtuala Kinejo kaj la Poŝtkarto de Espero, la VK havos unikajn kontribuojn:

- Malfermaj bonvenigaj vortoj de grava kanada indiĝena historiisto kaj membro de la Honora Komitato de la 105-a UK;
- Salut-mesaĝo de la urbestro de Montrealo;
- Koncerto de Joelle Rabu, escepte bona kaj monde konata kanada kantistino;
- Rektorado de Geoffrey Greatrex, kanada esploristo, por la 73-a sesio de Internacia Kongresa Universitato, kiu okazos virtuale kadre de la VK;
- Prelego "La kanada odiseado, lando bazita sur nekompletaj konkeroj", kadre de la Scienca Kafejo, de la Honora Prezidanto de la montreala LKK, Wallace G. du Temple;
- Prelego "La valoroj de Esperanto en ŝanĝiĝanta mondo", ankaŭ kadre de la Scienca Kafejo, de la ĉina kanadano John Huang;
- Unikaj aŭkciaĵoj ligitaj al 105-a UK;
- Virtualaj ekskursoj tra la urbo Montrealo;
- Montrealaj bageloj en la Kunmanĝado tra la Mondo;


- Aŭtoraj Momentoj, ia. pri la “Besta Verbaro” (vi scias kio estas “krokodili”, sed ĉu vi scias, kio estas “aranei”?!);
- Prelego pri la 107-a UK en 2022, kadre de “Venontaj UK-oj”;
- Ĉeesto de la montreala LKK dum la Virtuala Movada Foiro por babilado kun la publiko;
- Kaj multe pli!

Oni povas subteni tiun mirindan laboron per aliĝo al la VK kaj diskonigo de la aliĝilo: [vk.mondafest.net](http://vk.mondafest.net) - kaj same per donacoj al la kampanjo “2022 por 2022”, kiu celas simbole kolekti 2022 eŭrojn por Montrealo 2022 pere de la [Poŝtkarto de Espero](#).

Planoj por 2022 jam antaŭeniras! La LKK de la montreala UK ne haltis. Se vi estas inter la aliĝintoj al la 105-a UK, alia ebleco subvencii nian agadon estas proponi vian aliĝkotizon kiel donacon, informante tion al la Kongresa Fako per [kongresoj@co.uea.org](mailto:kongresoj@co.uea.org). Eblas ankaŭ proponi liberan donacon ĉe [www.uea.org/alighoj/donacoj/virtuala_kongreso](http://www.uea.org/alighoj/donacoj/virtuala_kongreso).

Ĉi-semajne la VK sukcesis atingi la nombron de aliĝoj al la 105-a UK je marto 2020, kun nuntempe pli ol 824 aliĝoj.

## E SONO 133!



Dr. ESPERANTO.

LANGUE INTERNATIONALE

PRÉFACE

et

MANUEL COMPLET.

por Franc.o.j

Pour qu'une langue soit universelle—
il ne suffit pas de lui en donner le nom.

Prix 50 cent.

VARSOVIE.

En vente chez Gebethner et Wolff.

1887.

704.674-B.Esp



## PILLOLE DI SALVEZZA 1053: ANTONIO MACHADO

Il 26 luglio è l'anniversario della nascita (nel 1875) del poeta e scrittore spagnolo (andaluso) Antonio Machado (1875-1939), it.wikipedia.org/wiki/Antonio_Machado, uno dei maggiori esponenti della cosiddetta "Generazione del '98", al tempo stesso portatore di una profonda filosofia e interprete dell'animo popolare. Fortemente impegnato in politica a favore del Governo repubblicano di sinistra, al termine della Guerra civile spagnola morì esule in Francia, mentre il fratello Manuel militò nelle fila franchiste di destra.

Alcune sue opere sono state tradotte in Esperanto:

– "La tierra de Alvargonzález" (La lando de Alvargonzález), trad. Fernando de Diego, HEF, Zaragoza 1969 (recensione di Leopoldo Knoedt in "Esperanto de UEA" 1970-6, p. 100); da notare che la traduzione fu edita quando Francisco Franco (1892-1975) era ancora in vita;

– Sette poesie (Sep poemoj), trad Fernando de Diego, in "Sentempa Simfonio, poem-antologio hispana", La Misma, Madrid 1987.

Alleghiamo il francobollo spagnolo del 1978 in memoria di Antonio Machado.

